



Boletín

nº 427 Julio - Septiembre 2019



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 427

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun per-
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3^a, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrun

Kasisto: Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor

“ Alberto Granados

Prezidanto HEJS: William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Kiam oni spertas UK-on, oni pripensas la aferon organizi ion similan, ho, ve! kiaj pensoj. Nur ĉeesti, partopreni kaj verki raporton pri la evento, jam estas peza, agrable peza afero por mi, ĉar mi ĝuas de la komenco ĝis la fino, salutante geamikojn el la tuta mondo babilante kun ili per la internacia lingvo. Ĉio estas kiel revo, kiun multaj homoj vivas kvazaŭ realo.

Mi profitas ĉi tiun spacon por vigligi la legantaron ĉeesti tiajn kongresojn, ĉar en Lahtio mi vidis nur kelkajn hispanojn. Certe ke multaj ne povas pro la alta kosto, sed oni povas ŝpari kaj almenaŭ unu fojon en la vivo vi devus partopreni la eventon.

En majo 2020 okazos hispana kongreso en Comillas proksime al Santandero. Mi certas ke multaj homoj interesiĝas, ĉar la evento valoras la penon, pro la beleco de la urbo, kaj la okazo renkontiĝi kun homoj el la tuta Hispanio kaj eksterlando. Ni, la spertuloj pri kongresoj devas aliĝi kiel eble plej baldaŭ kun la celo vigligi la ceterajn kaj briligigi la esperantan feston ĉe la nordo de Hispanio.

En ĉi numero vi legos raportojn pri diversaj kongresoj kaj artikolojn pri interesaj kaj kulturaj aferoj pri literaruro kaj muziko, interalie.

Ĝuu la legadon.

La redakcio

ENHAVO

1. Salutvortoj. 2. Forpaso s-ro Antonio Ferrer Hervás. 3. Ne forgesu vian apogon al la Federacio/ HEF festis la Eŭropan Tagon de la Lingvoj. 4. Raporto-bilanco de la kurso Esperanto-A2 en UNED. 5. Nova kurso de Esperanto en la universitato UNED. 6. La prezidanto de HEF vizitis Seulan Esperanto-Grupon / Specialaj mencioj de Esperanto en televido. 7. Tradukoj de galega literaturo al Esperanto. 8. Esperantistoj elektitaj en municipa balotado. 9. Pri grupoj kaj Asocioj / Vélez Málaga (Projekto Esperanto-Komuniko). 10. Konferenco en Malago de Federico Gobbo pri Esperanto / Ateliero pri Esperanto en Alcobre. 11. Sekvoj de la seminario pri lingvopolitiko en Afriko. 12. Verko de Juan Régulo Pérez / Prezento de libro en Valencio pri la rifuĝintoj. 13. Nova estraro de la Universala Esperanto Asocio. 14. Comillas estos la sidejo de la 72-a Hispana Kongreso de Esperanto. 16. 79-a Hispana Kongreso de Esperanto. 17. Aliĝilo 79-a Hispana Kongreso de Esperanto. 18. La Andaluzia rockmuziko. 20. Raporto pri la 104-a Universala Kongreso de Esperanto. 24. Renkontiĝo dum la Douglas-Tagoj en Tebo (Malago). 25. Kroniko pri onikrimoj. 27. SAT-Kongreso en Barcelono. 30. Pluas la “Elkatakombigo de la E-Kulturo” ekster esperantujon en Madrido.

Ĉefpaĝo, Federico Gobbo, profesoro de Interlingvistiko kaj Esperanto en Amsterdamo

FORPASO DE S-RO ANTONIO FERRER HERVÁS



S-ro Antonio Ferrer Hervás (1937-2019) forpasis en Santa Cruz de Tenerife, la pasintan 12-an de Septembro kiam li estis ekope-raciota en hospitalo. Esperanta Societo de Tenerife restiĝas sen unu el ĝiaj plej gravaj kaj antikvaj membroj, ĉar certe li laŭlonge deĵoris kaj aktivis en la esperanta movado de Tenerife, decide kaj engaĝe. Lia familio devenas el Valencio kie li naskiĝis en 1937, kaj ekloĝis en La Laguna tuj post la hispana civila milito. Esperanto estis grava afero por lia familio, kiu fariĝis vera espe-ranta rondo, tiel estis, ke du el liaj fratinoj, Ana kaj Asunción, edziniĝis al du balkanaj esperantistoj. Li prenis la esperantan torĉon kaj seninterompe laboris por Esperanto en La Laguna kune al S-ro Juan Régulo Pérez (1914-1993) kaj ceteraj unuaj kaj nunaj membroj de ESTO, kies estraron li partoprenis kiel Sekretario kaj Prezidanto. Profesie li estis licea katedra profesoro pri desegno. Samtempe li okupiĝis pri arta gravurado kaj grafika desegnado. Kiel pentristo lia laboro estis preskaŭ intima hobbio: pentris precipe pejzaĝojn de Tenerife kaj portretoj, kiujn plimulte oni konservas hejme.

NE FORGESU VIAN APOGON AL LA FEDERACIO!

En sia lasta kunveno, la estraro bedaŭrinde konstatis la mankon de pago de kotizo ĉe multaj anoj dum la lasta jaro. Se hazarde vi forgesis pagi ĉijare, aŭ se vi ŝanĝis vian bankokonton, aŭ havis alian malfacilaĵon, bv kontakti kun la kasisto, en la adreso financoj@esperanto.es, aŭ skribu al la sidejo, por solvi la problemon. En la venontaj semajnoj ni skribos rekte al la anoj kiuj lastatempe ne pagis sian kotizon, por rememorigi pri tiu cirkonstanco. Kvankam la estraro estas ĉiam fleksebla pri la akurateco en la kotizpago, memoru ke laŭ nia statuto la manko de pago dum unu jaro estas kaŭzo por malaligo al la asocio.

Memoru ankaŭ ke la kotizoj estas la ĉefa fonto de enspezoj por la Federacio, kaj sen ĝi ni apenaŭ povus plenumi niajn celojn. Atentu krome ke la kotizo havas tre altan fiskan avantaĝon, kaj ke, depende de via loĝloko kaj viaj cirkonstancoj, eĉ 75% de via kotizo (kaj de viaj donacoj al nia asocio) estas repagata de la hispana ŝtato, aŭtomate en via impostodeklaro.


La estraro ankaŭ decidis lanĉi kampanjon por aliĝi al la Federacio por la jaro 2020, por kreskigi la nombron de anoj. En venonta numero de Boletín ni publikigos la novan aliĝilon, sed dume memoru –kaj memorigu viajn esperantistajn kolegojn kaj amikojn ankoraŭ ne membrantajn en la asocio– ke eblas aliĝi rete en la adreso www.esperanto.es/inscripcion.

Ni atendas ĉiujn kun malfermaj brakoj, ĉar niaj anoj estas la sola forto de nia asocio.

HEF FESTIS LA EŬROPAN TAGON DE LINGVOJ

La 26an de septembro ĉiujare oni festas la Eŭropan Tagon de Lingvoj, laŭ iniciato de la Konsilio de Eŭropo. Hispana Esperanto-Federacio, kunlabore kun Madrida E-Liceo, organizis ĉijare ekspozicion en sia sidejo, de libroj de la eŭropa literaturo tradukitaj en Esperanton. La elmontri estis inaŭgurita la lundon, 23an kaj estis fermita la 30an kun kolektiva legado de pecoj de tiaj literaturoj, fare de ĉeestantaj esperantistoj.

Krome, HEF estis denove invitita partopreni en agado organizita de la institucio EUNIC, grupiganta la oficialajn eŭropajn lingvoinstitutojn. Temis pri iu “Speak dating”, fulma prezentado de pluraj lingvoj sinsekve. Ĝi okazis la vendredon 27an de septembro en la sidejo de la Goethe-Instituto de Madrido, kaj pri ĝi zorgis nia amiko Alejandro Escobedo.



RAPORTO-BILANCO DE LA KURSO ESPERANTO-A2 EN UNED

En la lingvo-lernejo de UNED, nome CUID ("Centro Universitario de Idiomas Digital y a Distancia"), dum la instruperiodo 2018/19 estis proponata kurso de esperanto de nivelo A2 laŭ la Komuna Eŭropa Referenc-kadro de lingvoj (KER), danke al interkonsento de UNED kun HEF.

La kurso realiĝis tute perrete (ne-ĉeeste) laŭ metodologio prilaborita de UNED.

Manuel Pancorbo, jam UNED-instruisto, estis ĝia kunordiganto kaj Félix Jiménez trapasis elekto-procedon por enposteniĝi kiel reta instruisto ("Tutor en Línea" aŭ TEL, laŭ UNED-ĵargono). Krome, li organizis la programon de la kurso, kreis ĝian enhavon, la ekzercaron kaj ekzamenaron. La enhavo mem de la kurso estis aparte defia ĉar temas pri 18 lecionoj alĵustigitaj al reta lernado pere de komputilo / poŝtelefono, kun multe da interagaj ekzercoj kaj plurmedia materialo; krome la pretigado de la kurso okazis dum ĝi disvolviĝis, kio streĉigis nin ĉiujn; estis kvazaŭ kuri kaj samtempe ŝnuri la ŝuojn! Por tia laborego Félix kalkulis kun la helpo de aliaj aktivuloj, i.a. Eduardo Berdor kaj Toño del Barrio.

Krome, dum la kurso, la CUID-estraro decidis aldoni postenojn por konversaci-gvidado (ankaŭ per informatikaj rimedoj) al ĉiu lingvokurso, do ankaŭ al esperanto-kurso; en la UNED-ĵargono temas pri "Tutor de Apoyo Virtual" TAV. Tiun postenojn akceptis Rubén Fernández.

La instrua periodo de la kurso komenciĝis en la unua semajno de novembro 2018 kaj finis meze de majo 2019; elkalkulinte feriperiodojn, entute 22 lekciaj semajnoj. Fine de majo kaj komence de junio okazis la ordinaj ekzamenoj kaj komence de septembro la eksterordinaj ekzamenoj.



Unidad 5. Kia estas la vetero?

Índice de contenidos



Lectura
Lectura



Gramática
Gramática



Ejercicios
Ejercicios



Cultura
Cultura

Enskribiĝis 50 lernantoj, el kiuj ĉirkaŭ dek montriĝis aparte aktivaj, kun multaj demandoj en la kurso-forumoj, partopreno en konversaci-rondoj, plenumo de taskoj, komentoj, eĉ plendoj. Kvankam tiu kvanto ne aspektas aparte impresa, en la normalaj bakalaŭraj kursoj de UNED la elcentaĵo estas averaĝe eĉ pli malalta. Krome, enskribiĝis plia studento laŭ formulo "nur-ekzameno", ("prueba libre", PL en la UNED-ĵargono), do kontraŭ pli malalta prezo la studento rajtas nur je la ordinaj kaj eksterordinaj ekzamenoj, sen aliro al la reta virtuala spaco kie la kurso disvolviĝas.

La KER-sistemo devigas ellabori kvar apartajn ekzamenojn por la kvar kompetentecoj: leg-kompreno, skrib-esprimado, aŭd-kompreno kaj parol-esprimado; ĉiu ekzameno devas esti aprobita por trapasi la kurson.



Tiel okazas ankaŭ, kompreneble, en la UNED-kurso. Entute ekzameniĝis, inter junio kaj septembro, 21 studentoj. Aprobis ĉiuj krom 3, ĉu pro fiasko en unu aŭ pli el la ekzamenoj, ĉu pro nerealigo de unu aŭ pli el la ekzamenoj. Denove, la elcentaĵo estas super la averaĝo de bakalaŭraj kursoj, sed mi ne havas datumojn por kompari kun aliaj lingvoj de CUID.

Por la venonta instruperiodo 2019/20 la kurso esperanto-A2 pluas. Sed bedaŭrinde ne eblis proponi al CUID la sekvan nivelon, B1, ĉar mankis tempo por dediĉi al ĝia pretigado. Espereble dum la sekvaj monatoj niaj aktivuloj kun apartaj instruaj talentoj alprenos la torĉon ellabori ĝin por la kurso 2020/21.

Manuel Pancorbo

NOVA KURSO DE ESPERANTO EN LA UNIVERSITATO UNED

La 3an de septembro malfermiĝis denove la ŝancon enskribiĝi en la lingvaj kursoj de la Hispana Ŝtata Universitato por Neĉeesta Lernado (UNED), inklude, por la dua jaro, de la kurso de Esperanto.

En tiu ĉi jaro 2019-2020 eblas denove komenci je elementa nivelo, tiel ke je la fino oni atingas la nivelon A2 laŭ la Eŭropa Referenckadro. La kurso estas tutorigita, neĉeesta, kaj fine, post la koncerna ekzameno, oni atingas oficialan diplomon de la Universitato Neĉeesta Centro pri Lingvoj (CUID) de la UNED. Ĉiuj necesaj informoj pri la enskribiĝo troviĝas en la reta ligilo <http://www.cuid.uned.es/>. Eblas aliri tie ankaŭ la Gvidilon de la kurso kaj la informojn pri kontakto.

Jam en la pasinta akademia jaro 2018-2019 okazis la unua eldono de la kurso, kun sufiĉe da sukceso. En aparta artikolo ni prezentas bilancon de la kunordiganto de la kurso, Manuel Pancorbo, pri la pasintjara sperto.

En tiu ĉi jaro denove Hispana Esperanto-Federacio kunlaboras kun la UNED en diversaj aspektoj, inklude de la fiksado de kriterioj, pretigado de la lernomaterialo, havigo de aldona materialo, selektado de la instruisto, ktp. Ĉiukaze, pri la organizado respondecas la Universitato, en kies retejo eblas kontroli ĉiujn detalojn kaj efektiviĝi la formalan enskribiĝon.

Krome, HEF-estraro aprobis la kunvokon de du stipendioj por junaj lernantoj de la venonta kurso. HEF pagos la duonon de la kosto de la kurso al du lernantoj ĝis 30-jaraĝaj. Oni valorigos akademiajn kaj aktivadajn meritojn, kaj estos nepra kondiĉo ke ili sukcesu la ekzamenojn de la kurso. Interesitoj sendu sian kandidatecon ĝis komenco de novembro al la adreso: kurso@esperanto.es.

Aliflanke, kiel ni informis en pasinta Boletín, estis aprobita la okazigo de la kurso de Esperanto je nivelo B1 por venonta jaro 2020-2021, sed por tio Hispana Esperanto-Federacio bezonas la kunlaboron de spertaj esperantistoj, kiuj deziras helpi en la ellaborado de la necesa materialo. Bv kontakti kun la asocio en la sama adreso kurso@esperanto.es, por interkonsenti pri tiu kunlaboro.

LA PREZIDANTO DE HEF VIZITIS SEULAN ESPERANTO-GRUPON

La prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio vizitis Koreion, pro familia festo, kaj profitis la okazon por renkontiĝi kun esperantistaj amikoj en Seulo. Li vizitis la sidejon de la seula filio de Korea Esperanto-Asocio la 12an de aŭgusto, kaj prelegis pri Hispanio kaj E speranto-movado en Hispanio.

José Antonio del Barrio donacis nome de HEF ekzemplerojn de la karto entenanta la verkon Don Quijote al la reprezentantoj de la urba sekcio kaj la landa asocio. En la kunsido estis gratulo por nova estrarano de UEA prof. SO Jinsu.

Poste li momente vizitis ankaŭ la Seulan Esperanto-Kulturcentron, troviĝantan en la sama konstruaĵo, kie ties estro, LEE Jungkee, donacis du librojn por HEF: 'Vojaĝo de Onia' kaj 'Leteroj el Koreio'.

Poste la grupo iris festi al apuda restoracio, kie okazis tostoj kaj rememoroj pri la partopreno de pluraj ĉeestantoj en la hispana kongreso en Madrido en 2008.



SPECIALAJ MENCIOJ AL ESPERANTO EN TELEVIDO

Esperanto aperis fine de aŭgusto kaj komence de septembro dum pluraj tagoj en televido pro iom hazarda kialo: la apero de la prezidanto de la Federacio, José Antonio (Toño) del Barrio, en la tradicia kaj konata televida kvizo "Saber y ganar" ("Scii kaj gajni"), kiun elsendas la ĉeno La 2 de la ŝtata televido RTVE, kaj prezentas la tre fama Jordi Hurtado.



La ĉefaj mencioj al Esperanto okazis en la prezentado en la unua programo (30a de aŭgusto) kaj en la programo de la sekva vendredo. Jordi Hurtado komentis la esperantistecon de la kvizanto, kaj foje demandis pri vortoj en la internacia lingvo, kiel "buena suerte" aŭ "la familia de Carlos IV".

Se vi ne povis ĝin spekti, la programoj estas ankoraŭ alireblaj en la retejo de la programo:

TRADUKOJ DE GALEGA LITERATURO AL ESPERANTO

En julio alvenis du tre bonaj novaĵoj pri la disvastigo de la galega literaturo en Esperanto, danke al la klopodoj de la viga esperantisto Suso Moinhos.

Unue aperis en la eldonejo Mondial lia traduko al Esperanto de la kolekto de rakontoj de Begoña Paz, "La vundo", unue verkita en la galega lingvo, kun titolo "A ferida". Temas pri noveloj diverstemaj, sed ĉiam kun roluloj ĉe ekstremaj situacioj.

Fine de tiu sama julia monato aperis nova traduko, kun titolo "Vundita vento", esperantigo de "Vento ferido" (1967), la unua verko de la galega prozisto Carlos Casares (1941-2002). Temas pri dek du rakontoj kun diversaj temoj: elreviĝo antaŭ realo, soleco, subpremado, perforto (fare de homoj aŭ de la naturo) k.a. La dua novelo, "Kiel lupoj" priskribas areston por promeniĝo de la Civila Gvardio dum la diktaturo de Franco; tio kaŭzis senfruktan provon de la cenzuro konfiski la presitajn ekzemplerojn. La libro estis publikigita de Eldonejo Espero, el Slovakio, kaj enhavas emociplenan antaŭparolon de Håkan Casares Berg, filo de la aŭtoro, kaj enkondukan studon de Iolanda Galanes, profesoro de la Universitato de Vigo.

Informoj pri ambaŭ eldonoj aperis respektive en La Voz de Galicia kaj en Faro de Vigo.



Ambaŭ verkoj estas granda antaŭenigo en la diskonigo de la galega literaturo, kiu ĝis nun havis du librojn tradukitajn al Esperanto: "Viveroj" (de Castella, tradukis Fernando de Diego) kaj "Memoraĵoj de kampara knabo", klasikaĵo de Xosé Neira Vilas, ankaŭ tradukita de Suso Moinhos.

Ni profitas la okazon por informi ankaŭ ke Suso Moinhos ricevis la unuan kaj duan premiojn de la branĉo Eseo en la Belartaj Konkursoj de UEA en 2019. Gratulon al li!

ESPERANTISTOJ ELEKTITAJ EN MUNICIPALAJ BALOTADOJ



Kelkaj esperantistaj amikoj estis elektitaj en la municipaj balotadoj okazintaj en majo en Hispanio.

Isidoro Ortega, prezidanto de la esperantista grupo en Fuenlabrada (granda urbo de la aglomeraĵo de la ĉefurbo Madrido) daŭrigos kiel Unua Vicurbestro, kaj

magistratano pri prezidenteco, modernigo, malferma administrado kaj edukado (en la apuda foto, meze apud la urbestro)

Manel Sales, membro de la klubo Tarragona Esperanto, estas la nova vilaĝestro de la bela vilaĝeto Renau, kiu troviĝas meze de vitejo, 12 km. for de Taragono. Kelkaj klubanoj ĉeestis la posteniĝon (vidu suban foton) kaj gratulis la novan vilaĝestron.



En Teruelo, eĉ du anoj de la loka esperanta grupo Liberanimo partoprenis en la unua loko de siaj respektivaj balotaj organizaĵoj, kaj estis elektitaj kiel magistratanoj de la urbo: Blanca Villarroja (sekretario de la grupo) kaj Anabel Gimeno.

Ni gratulas ilin ĉiujn kaj deziras bonan sukcesan agadon. Se iu el niaj legantoj konas aliajn kazojn, bv informi nin.

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

ANDALUZIO

Vélez Málaga (Malago)

Ĉe la lernejo IES Almenara en la urbo Vélez Málaga, 16 gelnantoj de Humanistiko kaj Historio partoprenis la projekton "Esperanto Komunikado" kie partoprenas homoj el Italio, Francio, Litovio, Hungario kaj Grekio.



Ĉar ĝi estas iniciato de la kategorio K1, interŝanĝoj okazas nur inter instruistoj. Fakte la ses instruistoj de ĉi instituto jam vojaĝis al pluraj el ĉi tiuj landoj. Kune kun Fabián Jiménez, kiu havas C1-gradon de Esperanto

de la Universitato de Budapeŝto, profesoroj Belén Camacho (de Filozofio kaj kun B1-Esperanto-nivela atestilo), Juan Manuel Merchán (angla), Ana Van Hilten (Angla), María José Cabezas (latina kaj Antikva greka) kaj Christina Serrano (franca).

La celoj de la programo estas lernado de lingvoj per Esperanto, plivastigo de la kleriga oferto de la centro kaj akcelado de eŭropa civitaneco. La aspiro de ĉi tiuj instruistoj estas, ke ĉi instituto fariĝu regiona kaj nacia referenca centro en la instruado de la lingvo, kiu jam estas instruata en publika edukado en aliaj landoj kiel Hungario, Brazilo aŭ Ĉinio kaj estas parolata de ĉirkaŭ du milionoj da homoj tutmonde, kvankam ili ne estis oficialaj en iu ajn teritorio.

La ideo de la "Esperanto Komunikado" estas, ĉefe de la geinstruistoj Fabián Jiménez kaj Belén Camacho, ambaŭ regas sufiĉe bone la internacian lingvon. Gratulon kaj sukceson al ili.

La novaĵon publikigis rete kaj papere la malaga ĵurnalo SUR.

<https://www.diariosur.es/axarquia/esperanto-entra-aula-20190922213814-nt.html>

Malago

KONFERENCO EN MALAGO



Federico Gobbo, profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperantologio en la Universitato de Amsterdamo, sukcese partoprenis en la konferenco EUROPHRAS 2019, en la Fakultato de Humanistiko, Teatinos Campus, de la Universitato Malago, inter la 25a kaj 27a de septembro.

La titolo de lia disertaĵo estis "Constructive Linguistics for Computational Phraseology: the Esperanto Case". La sukceso estas parte la konsekvenco de lia

partopreno en la pasinta hispana kongreso en Malago.

Kun granda ĝojo kelkaj malaganoj gustumis "Churros kun ĉokolado" en la kafejo Esperanto.

Alcossebre (Castellón)

Ateliero pri Esperanto en Alcossebre

La duan de julio, en Alcossebre (Castellón), ĉirkaŭ kvindek infanoj kaj adoleskantoj partoprenis mallongan atelieron pri Esperanto. Illi ĝuis feriajn tagojn en kampadejo por "talentuloj".

(Mi volas rimarki ke mi uzas la vorton "talentulo" ĉar tiel nomiĝas la asocio kiu organizis la kampadejon: Valencia asocio de talentaj infanoj. Laŭ mia sperto, ĉiuj infanoj estas talentaj. Sed estas ni, plenkreskuloj, precipe gepatroj kaj geinstruistoj, kiuj detruas iliajn kapablojn, iliajn scivolemon, pere de nia maniero eduki. Ni ne fidus infanojn, kaj trudus al ili niajn konojn kaj vidon de vivo; kaj tio preskaŭ neniam rilatas al veraj profundaj bezonoj kaj interesoj de la infanoj... Sed ĉi tio estas alia afero...)



Sub la ĝenerala temo "komunikado" oni proponis al ili diversajn programerojn: ludojn, sportojn, atelierojn pri brajlo kaj Morsa kodo... Mi estis petita organizi mallongan atelieron pri esperanto, ne prelegon sed ion pli praktikan, dum unu horo kaj duono. Estis defio pripensi kiel kaptadi atenton de tiom da geknaboj inter 8 kaj 14 jaroj, kiuj probable neniam antaŭe aŭdis pri esperanto. Mi ankoraŭ ne scias kial mi akceptis, sed je la fino mi kaj ili tre kontentis pri la rezulto.

Tiaj "talentulaj" infanoj ege deziras lerni; ili tre atentis kaj partoprenis per multaj demandoj en la unua parto de la ateliero: mallonga prezento de la historio de la lingvo. Kaj dum la dua parto, kiam mi proponis lingvan ludon por krei vortojn helpe de afiksoj, ili eĉ pli aktive partoprenis... Tiel ke ne estis tempo por fari ĉion kion mi preparis. Je la fino, ili povis foliumi kelkajn vortarojn, librojn kaj komiksojn kiujn mi kunportis.

Kelkaj knaboj estis vere impresitaj kaj ili ege dankis, ne nur per vortoj sed per la mieno, ke ni konigu al ili ĉi tiun trezoron.

Mónica Cruz

Sevilo

SEKVOJ DE LA SEMINARIO PRI LINGVOPOLITIKO EN AFRIKO

En la pasinta Boletín ni anoncis la okazigon de seminario pri la lingva maljusteco en Afriko, organizita de la Universitato de Sevilo, "Afriko en mondo de lingvoj". La libron kun konkludoj de la seminario eblas legi jam en la retejo <http://institucional.us.es/marco/>

Naskiĝis krome diversaj ideoj kaj projektoj por daŭrigi la agadon kaj la iniciaton. Ekzemple, nia kolego kaj ĉeforganizanto Vicente Manzano, informis ĉeestantojn pri la SEP, priprogramada semajna renkontiĝo (Somera Esperanta Programado) kiu estis okazonta samtempe en la sekvanta Somera E-

Esperanto.Studado. Oni diskutis ankaŭ pri eblecoj krei mapon de afrikaj muzikoj, kun kunlabora sistemo. Programistoj kaj intereso pri muziko kaj pri aliaj kulturoj kontaktu kun Vicente <[vmanzano \(ĉe\) us.es](mailto:vmanzano@us.es)>

Ni rekomendas ankaŭ la legadon de artikolo, pri lingva tiraneco, verkita de unu el al kunlaborantaj profesoroj de la kurso, en la retejo de andaluzia portalo <https://portaldeandalucia.org/opinion/la-tiraniamdel-ingles/>, sekve al tiu iniciato.



Tenerifo

VERKO DE JUAN RÉGULO PÉREZ



Esperanta Societo de Tenerife ESTO, ĵus eldonis la tradukon de la grava prelego de la fama kanaria eldonisto S-ro Juan Régulo Pérez (1914-1993), kiun li eldiris en 1984 kiam estis titolita Adopta Filo de la urbo La Laguna, insulo Tenerife. Tiu prelego kutime estas konsiderata kiel lia kultura testamento. Ĉi tiu traduko estis longdaŭra deziro hodiaŭ jam plenumita.

Cheste (Valencio)

PRESENTADO DE LIBRO EN VALENCIO PRI LA RIFUĜINTOJ

La 13an de junio, okazis en la sidejo de la Fundación Cajacheste, en la urbo Cheste (proksima al Valencio) la prezentado de la libro “Los trenes de la esperanza, Esperantistas solidarios: niños y niñas austriacos en la región valenciana” (La trajnoj de la espero: Solidaraj esperantistoj, aŭstraj geinfanoj en la valencia regiono). En la prezento partoprenis la aŭtoro, José Vicente Castillo, la prezidanto de la eldona fondumo, Rafael Lozano, kaj la magistratano pri kulturo, M^a Ángeles Llorente.



La verko de Castillo rakontas la historion de pli ol kvarcent aŭstraj geinfanoj kiuj estis portempe loĝigitaj en 1920 en Hispanio, pro la situacio de ekstrema malriĉeco en kiu troviĝis Aŭstrio post la Unua Mondmilito. La peto estis farita de la esperantista grupo de Graz, por ke la infanoj de tiu urbo povu fuĝi el la tiama malsato kaj mizero dum kelkaj monatoj. Ĝi rakontas ankaŭ kiel disvolviĝis la loĝigo en la valencia regiono, la problemojn kiujn oni devis superi, kaj la okazintaĵojn kiuj naskiĝis en la vojaĝo kaj en la ĉeesto en la diversaj urboj kiuj gastigis ilin.

La prezenton ĉeestis pluraj esperantistoj el la urbo Cheste kaj el Valencio.

NOVA ESTRARO DE LA UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Universala Esperanto-Asocio (UEA), la plej granda asocio dediĉita al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto, en kiu membras nia Federacio, renovigis sian estraron dum la Universala kongreso okazinta en julio en Lahtio (Finlando).

La nova prezidanto estas Duncan Charters, profesoro de Principia College, en Elsah (Ilinojso, Usono). Duncan estas specialisto pri la hispana lingvo kaj kulturo, plurfoje vizitis Hispanion kaj estis invitita de pluraj hispanaj kongresoj de Esperanto, kie li prelegis pri instruado kaj aliaj rilataj temoj.

La vicprezidantoj estas Fernando Maia, el Brazilo, kaj Huang Yinbao, el Ĉinio. Aliaj estraranoj estas: Aleks Kadar, Orlando Raola, Jérémie Sabiyumva, So Jinsu kaj Amri Wandel.

Hispana Esperanto-Federacio kaj la hispanaj esperantistoj ĝenerale gratulas la novan skipon kaj deziras al ili bonŝancon kaj entuziasmon en siaj projektoj de disvastigo de nia lingvo.

Ankaŭ estis renovigita la estraro de la Tutmonda Esperantista Junulara Asocio (TEJO), en kiu membras nia junulara sekcio HEJS, dum la internacia junulara kongreso de Esperanto okazinta en Slovakio. La nova prezidanto estas Joop Kieffe, la sola eŭropano en skipo tre diversa laŭ sia deveno. Bonŝancon ankaŭ al la novaj respondeculoj!



COMILLAS ESTOS LA SIDEJO DE LA 79-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Comillas, municipo kaj urbeto de la aŭtonoma subŝtato Kantabrio, situas en la komarko Okcidenta Marbordo. Ĝi rimarkindas ne nur por ties mezepokaj kaj barokaj konstruaĵoj, sed ankaŭ ĉar ĝi estas unu el la malmultaj lokoj ekster Katalunio, en kiuj konstruis modernistaj artistoj kiel Antoni Gaudí aŭ Domènech i Montaner. Iliaj verkoj abundas kaj videblas en la tuta urbo.

La urbo havigas nomon al la Pontifika Universitato Comillas, kies sidejo situas en tiu kantabra urbo ĝis sia translokigo al Madrido. La iamaj konstruaĵoj de la universitato estas unu el plej elstaraj ekzemploj de la modernisma arkitekturo de la urbo. Nuntempe ĝi estas sidejo de unu el la kampusoj de la Universitato de Kantabrio.

Populare la urbo estas konata kiel "urbo de la episkopoj", pro la fakto ke en ĝia universitato instruiĝis gravaj ekleziaj figuroj. Dum granda parto de la 19a kaj 20a jarcentoj, al ties tradicia markaraktero, aldoniĝis la fakto ke ĝi fariĝis somerumejo de la hispana reĝa familio, kaj sekve ankaŭ de la hispana nobelaro kaj aristokrataro, speciale madrida, kataluna kaj eŭska. Nuntempe, ĝi estas tre ŝatata kaj vizitata somerumejo, same kiel aliaj marbordaj lokoj de Kantabrio.



Comillas sidas ĉemare. Ĝia plaĝo, el delikata orkolora sablo, havas ĝian saman nomon. Krome, ĝia marbordo havas multenombrajn klifojn, kiel tiuj de "El Cabrero (La kaprobredisto)" kaj "La Gari-ta".

Okcidente de Comillas troviĝas la estuaro "La Rabia", naturrezervejo por akvobirdoj, kie videblas cignoj kaj anseroj. La estuara enfluejo situas en "Valdáliga", en la naturrezervejo "Oyambre (pron: Ojambre)", strando kun belegaj dunoj. En ĝi, oni povas vidi monumenton nomatan "La flava birdo". kiun la loĝantaro starigis omaĝe al aviadiloj, kiuj venante el Ameriko forkonsumis sian fuelon kaj devis surteriĝi sur la strandon.

La plaĝo longas de Trasmía (Comillas) ĝis la kabo de Oyambre ("Valdáliga" - San Vicente de la Barquera).

Cetere, Comillas estas ĉirkaŭata de monto Krono (monte Corona). kiu ne nur estas surkovrita de arbaro kun multaj arbospecioj, precipe kaŝtanoj, sed ankaŭ havas bonan specimaron de la kantabra bestaro.

La municipo de Comillas posedas kelkajn publik-interesajn kulturhavaĵojn:

- * La Kaprico (El Capricho), konstruaĵo de la arkitekto Antonio Gaudí. Ĝi elstaras pro siaj mozaikoj kaj "sunfloroj". En aparta angulo, apud la konstruaĵo, troviĝas statuo de la aŭtoro.
- * Fasado de la tombejo, kun statuso de monumento ekde 1983. Sur unu el la muroj de la manova preĝejo elstaras skulptaĵo "La Ekstermanto", modernisma verko de Josep Llimona (1895).
- * Malnova Pontifika Universitato: Krom la seminario, rimarkindas la korto-pordego kaj la multnombraj ĝardenoj.
- * Palaco de Sobrellano, ankaŭ nomata Palaco de la Markizo de Comillas: En unu el ĝiaj flankoj rimarkindas la Maŭzoleo-kapelo, kie estas entombigita la markizo kune kun la familianoj. La palaco kaj la Kapelo troviĝas sur verda kampo kun multaj arboj.
- * Groto de La Meaza, situanta en la vilaĝo "Ruiseñada", arkeologia zono.
- * La urbeto Comillas havas la statuson de Historia Ensemblo ekde 1985.
- * La preĝejo de Sankta Kristoforo (hispane: San Cristóbal), baroka konstruaĵo starigata de 1640 ĝis la fino de la 18a jarcento. Ekstere rimarkindas ĝia turo, kompletigita per franc-stila pinaklo, kaj interne ĝiaj beleco kaj amplekso.

LKK



79A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

KantEA organizos la 79an Hispanan Kongreson de Esperanto. La Loka Kongresa Komitato konsistas el:

Prezidanto: s-ro Carlos Cordero Huecas

Sekretario: s-ro Pedro Ullate López

Kasisto: s-ino Guadalupe Barcina Amézaga

La 5an de julio, la LKK, kune kun la Estraro de KantEA, decidis elekti kiel sidejon de la kongreso, kiu okazos de la 30a de aprilo ĝis la 4a de majo de 2020, la urbeton Comillas. Oni ankaŭ decidis asigni diversajn respondajn laborpostenojn en rilato al la kongresa organizado. La kongresan afiŝon, aranĝis la kantabra dizajnistino Laura Tejedor, membro de nia Asocio.

*

Cetere, KantEA starigis propran asocian retpaĝaron, kun la helpo de HEF. La administranto de la retpaĝaro estas la Prezidanto de la asocio, Rafael, Moncalián. La paĝaro estas dulingva kaj ĝi konsistas el diversaj fakoj, kiuj proponas interesajn informojn. Jen ĝia retadreso: <http://www.esperanto.es/kantea>

*

La 23an de aŭgusto, la membraro de Kantabra E-Asocio elektis jenan novan estraron:

Prezidanto: Rafael Moncalián García

Sekretario: Pedro Ullate López

Kasistino: Guadalupe Barcina Amézaga

Voĉdonantino: María Carmen Blanco Peña

Voĉdonanto: Carlos Cordero Huecas

*

La 24an de aŭgusto vizitis la ĉefurbon de Kantabrio, la vicprezidanto de HEF, Ángel Arquillos kaj Mariló Torres. Kvankam dum la vizito oni parolis pri la venonta kongreso, okazonta en Comillas, la tago estis dediĉita precipe al vizitado de turismaj lokoj kaj al ĝuado de la somera santandera etoso.

María Zocato



Fotis Miguel G. Adúriz



79a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

Comillas (Kantabrio)

30a de aprilo — 4a de majo 2020

ALIĜILO

Plenigu ĉi aliĝilon, kaj sendu ĝin al la sidejo de KantEA (San Fernando 58, P-8; 39010 Santander). Ankaŭ eblas uzi la adreson kongreso@esperanto.es, aŭ la retejan formularon: <http://www.esperanto.es/kongreso/>

PERSONA NOMO FAMILIA(J) NOMO(J)
 ADRESO
 URBO (.....)
 RETADRESO TELEFONNUMERO(J)
 MEMBRO DE HEF: Jes Ne NASKIĜDATO (nedevige, nur por statistiko aŭ rabato)

DATO DE PAGO⁽¹⁾ MANIERO DE PAGO
 KATEGORIO
 KOTIZO + DONACO = SUMO

KOTIZOJ

KATEGORIOJ	Aliĝo ĝis la 30a de novembro 2019 ⁽¹⁾	De la 1a de decembro ĝis la 29a de februaro 2020 ⁽¹⁾	Post la 1a de marto 2020 kaj surloka aliĝo
Membro de HEF aŭ KantEA	37€	47€	57€
Ne membro de HEF aŭ KantEA	47€	57€	67€
Juna membro de HEF/KantEA (sub 30) ⁽²⁾	27€	37€	47€
Junulo ne membro de HEF/KantEA (sub 30)	32€	42€	52€

La aliĝo estas senpaga por nepraj akompanantoj de handikapuloj kaj naskiĝintoj post 31-12-1999.
 Se vi volas partopreni la kongreson, sed vi havas ian malfacilaĵon, bonvolu kontakti la organizantojn.

(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago.

(2) Sama rabato estas aplikebla al lernantoj de Esperanto ĉeestantaj kursojn organizitajn de grupoj aliĝitaj al HEF, komenciĝintajn inter septembro 2019 kaj aprilo 2020

Bonvolu pagi la kotizon jene: per Paypal (79ahispanaesperantokongreso@gmail.com) (como pago a un amigo / kiel pago al Amiko); per banko, nepre indikante la tekston "Kongreso" kaj vian nomon, en la bankokonto de "Asociación Cántabra de Esperanto"; Caja Rural de Burgos: ES06 3060 0071 8421 3512 2212 /BIC: BCOEESMM060; aŭ per nia konto ĉe UEA: kodo (asce-h).

ALIAJ INFORMOJ

Pretas partopreni en la programo: (aparte menciŭ proponon)

Pretas partopreni en la spektaklo "VIVU LA TEATRO!": Jes Ne

Noto pri personaj informoj: via nomo kaj devenloko aperos en reta listo de aliĝintoj kaj en kongreslibro; vi rajtas sugesti la manieron sub kiu ĝi aperu. via retadreso aperos en listo disdonebla al aliaj kongresanoj, sed vi rajtas peti ke ĝi ne aperu. ceteraj informoj estos utiligataj nur por internaj celoj.

LA ANDALUZIA ROKMUZIKO (Ĉ.1970-1985)

(Mallonga kaj baza aliro al tiu ĉi temo)

A) UNUAJ PAŜOJ

La t.n. "Andaluzia Rokmuziko" estis muziko-stilo kiu naskiĝis komence de la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento. Tiu stilo celis iamaniere miksi modernajn muzikajn stilojn (ĉefe rokon, sed ankaj ĵazon kaj bluson) kun elementoj devenantaj de la tradicia andaluzia kaj flamenka muziko kaj kulturo. Oni devas atentigi pri tio, ke la roka moderna muziko elektita por tiu miksado estis precipe (kaj preskaŭ nure) tiu konata kiel "progresiva" aŭ "simfonia", t.e. tiu stilo sekvita de ensembloj kiel King Crimson aŭ Pink Floyd.

La unuaj spuroj de tiu nova stilo troveblas ĉirkaŭ 1970, per diversaj kreitaĵoj verkitaj de kelkaj hispanaj ensembloj kaj kantistoj. Oni povus nomi multajn artistojn, sed oni nur mencias la nomon de Smash (prononcu: smaŝ) ensemblo kies vivo daŭris jarkvinon (1968-1973), kaj kie membris gravaj muzikistoj kaj artistoj kiel Gualberto García kaj Manuel Molina.

B) TRIANA

Triana meritas apartan ĉapitron pro multaj kialoj. Unue, direndas ke Triana estas la nomo de famega kvartalo en la urbo Sevilo, de kie devenas la membroj de la ensemblo; jen la origino de ties nomo. En 1973 komenciĝis la historio de Triana, per la unuiĝo de ties 3 membroj: Jesús de la Rosa (voĉo, klavaroj), Eduardo Rodríguez Rodway (dua voĉo kaj flamenka gitaro) kaj Juan José Palacios "Tele" (drumo kaj frapinstrumentoj). Unuatempe oni planis ke aliaj muzikistoj aliĝu al la grupo, nome Manuel Molina kaj Dolores Montoya. Tamen, finfine tiuj du artistoj decidis krei sian propran flamenkan duon (konata kiel "Lole kaj Manuel") kiu multe sukcesis dum tiuj jaroj.



Do, la definitiva formo de Triana estis trio konsistinta el la 3 homoj antaŭe menciitaj, kvankam kaj por la registrado de iliaj diskoj kaj por la surscenejaj ludadoj oni inkluzivis basgitaron kaj elektragitaron, luditaj kutime de aliaj elstara andaluziaj muzikistoj, ofte amikoj de la membroj de Triana. Inter ili mencieblas homoj kiel Manuel Rosa (basgitaristo) kaj Luis Cobo "Manglis"(gitarludisto).

Fine de la jaro 1974, Triana komencis la surbendigadon de sia unua disko, nome “El Patio” (“La Korto”) publikigita je aprilo de 1975. Kvankam tiu albumo vendiĝis tre malmulte dum la unua monatoj, eĉ jaroj, post sia publikigo, oni povas aserti ke oni staras antaŭ unu el la plej elstaraj muzikaj kreitaĵoj en la historio de la hispana muziko. La antaŭe menciita ensemblo Smash miksis rokon kaj flamenkon, sed en tia maniero ke oni povus ĝin difini kiel “apudmetado”. Tamen, Triana, ĉe “El Patio”, ne "apudmetas", sed tute “kunfandas” ambaŭ stilojn, kreante sonajn etosojn neforgeseblajn, plenajn je forto, sentemo kaj originaleco. “El Patio” ja kompareblas al la plej gravaj verkoj de la anglaj progresivaj ensembloj.

La albumo konsistas el 7 pecoj, de tre diversaj daŭroj, sed kiuj konsistigas solidan muzikan unuecon. Eble la plej gravaj estus tiuj 3 plej longaj: “Abre la Puerta” (“Malfermu la Pordon”), “Sé de un Lugar”(“Mi scias pri loko”) kaj “En el Lago”(“Ĉe la Lago”). La aliaj 4 pecoj, ankaŭ plenaj je inspireco, utilas kiel “oraj pontoj” inter tiuj 3 pli kompleksaj. La entuto estas kaj restas nesuperebla.

Triana daŭrigis sian muzikan vojon iom post iom, tra la sekvantaj jaroj. Tiel, ili publikigis la jenajn albumojn:

- 1977: “Hijos del Agobio”(“Filoj de la Angorpremo”);
- 1979: ”Sombra y Luz“ (“Ombro kaj Lumo“)
- 1980: ”Un Encuentro“ (“Renkontiĝo“)
- 1981: ”Un Mal Sueño“ (“Malbona Sonĝo“)
- 1983: ”Llegó el Día“ (“Alvenis la Tago“).

Pristile, la traĭro de la Triana muziko iĝis pli kaj pli malpli "progresiva" kaj iom post iom pli “facila”. La nombro de vendoj de iliaj diskoj kreskis kaj ili iĝis unu el la plej popularaj ensembloj en la tuta Hispanio kaj eĉ en aliaj landoj de Eŭropo.

Bedaŭrinde, je oktobro de 1983 Jesús de la Rosa suferis tragikan aŭto-akcidenton, sekve de kiu li mortis. La historio de Triana finiĝis en tiu momento, kvankam kelkfoje Juan José Palacios kaj aliaj muzikistoj uzis la nomon “Triana” por kelkaj surbendigaĵoj kaj turneoj.



Juan García del Río

(Daŭrigata)

RAPORTO PRI LA 104-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Lahtio 20 - 27, julio 2019

Alveni en Finnlandon estis tre facila afero, post preskaŭ 3 horoj trajne de Malago ĝis Madrido kaj 4 horoj super la nuboj de Madrido ĝis Helsinko, kaj tuj poste ne multe da tempo atendante la valizojn kaj tuje la buson por trafi la urbeton Lahtion, kongresurbo kiu gastigis unu el la malpli nombrajn UK-on, laŭ mia sperto, sed tre amuza, bone organizita kaj bonetosa. Mi volas raporti pri la elstaraj programeroj, kiujn mi ĝuis kaj mi neniam forgesos.

Ĉio okazis ĉe originala kongresejo, ene de sporta konstruaĵo "Isku Areena" kie ludas glacihokeon la sporta teamo "Pelicans" tre proksime de la mondkonataj Skisaltejoj. Kun pluraj salonoj kaj salonetoj por okazigi la programerojn, diversajn kunsidojn, kaj relative granda salono kun bongusta kaj bonpreza finna manĝejo por satigi vegetaranojn kaj ĉiomangantojn, interalie.



La Komitataj kunsidoj oni okazigis ĉe la hokea ludkampo, kie la sono estis tre bona, kompreneble kun helpo de mikrofonoj. Oni diskutis pri gravaj aferoj dum kvar sesioj dum la semajno, kaj oni proponis kandidatojn por elekti la novan estraron kaj novan prezidanton, konata de ni ĉiuj : Duncan Charters. Oni decidis elekti du vicprezidantoj: Fernando Maia el Brazilokaj Huang Yinbao (Trezo) el Ĉinujo. la Ĝenerala Sekretario ne estis surprizo, ĉar daŭre estas Aleks Kadar. La ceteraj estraranoj estas: Pri Afrika kaj Aktivula Maturigo, Jérémie Sabiyimba el Burundo (granda surprizo por Afriko, ĉar Jérémie estas tre aktiva esperantisto kaj aranĝas la venontan Afrikan Kongreson okazonta en decembro 2019). La ceteraj estraranoj estas: Orlando Raola, kiu okupiĝos pri kongresoj, eldonado, kulturo, ktp. So Jinsu el Koreio, pri Azio kaj Oceanio, kaj Amri Wandel el Israelo okupiĝos pri la scienca kaj faka agado. François Lo Jacomo el Francio estis elektita nova sekretario de la Akademio. Oni diskutis pri la krizo, kiu laŭ mi solviĝos se ni ĉiuj apogas kaj subtenas la laborgrupon. En la vivo neebblas nenio.

Kiel kutime, ĉe UK estas komplike ĉeesti la plej ŝatatajn eventojn, ĉi foje pro manko de spaco ĉe malgrandaj salonoj, sed mi ne plendas, ĉar mi ĝuis eĉ la neplanitajn eventojn. Mi trairis de unu loko al la alia por trovi sidlokon ien ajn, kaj kie mi havis okazon, mi silente aŭskultis la preleganton pri Sumoo, Teo kaj amo, Akademio de Esperanto, la koncerton ĴeLe, koncerton Manŭel, kelkajn filmojn kiel *La Reĝino de Serpentoj*, Teatraĵon *Vivu Galileo* kiu brile prezentis Saŝa Pilipoviĉ kaj Ciganaj kantoj. La Aŭkcio, kiu sukcese gvidis nia samideano, Tonkin, estis vere interesa kaj alloga. Mi, kiel komitatano por Hispanio, ne havis tro da tempo, sed sufiĉe por aŭskulti la bonan muzikon de Asorti, Kajto, JoMo kaj aliaj. La Artaj Aranĝoj ĉiam estas mojosaj kaj ili estas miaj plej ŝatataj. Mi ne partoprenis ekskursojn kun la ideo profiti la programerojn, sed mi scias pri kelkaj vere interesaj kiel la antaŭkongresaj Krozado al Sankt-Peterburgo aŭ Helsinko, kiun mi vizitis post la kongreso antaŭ ol flugi al Madrido. Laŭ mia sperto, ĉiuj ekskursoj estis vere interesaj kaj mi gratulas la respondeculojn kaj la laboreman LKK, kiuj aranĝis veran internacian kongreson, kies temo *Vivanta Naturo, Floranta Kulturo*, oni sentis en la atmosfero de la belega Finnlando.



La plej grava momento estis dum la Internacia Vespero, kiam Indu Devi, dancistino el Nepalo ludis nepalan dancon, kaj tuj poste, ĉiuj silentis dum unu minuto pro la forpaso de nepala samideano s-ro Sitaran Sharma Dhakal, kiu vojaĝis kun la grupo de Nepalo, sed forpasis pro koratako. Ripozu pace. Li estis dumviva membro de Nepala Esperanto Asocio.

Mi kalkulis 14 salonojn kaj ĉiuj dediĉitaj al famaj esperantistoj el Finnlando, Svisio, Ĉeĥio, Islando, Japanio. Nomoj kiel Ivo Lapenna, Hector Hodler kaj kompreneble, ne mankis Lazaro Ludoviko Zamenhof.

La foto-ekspozicio pri Kroatio en la enirhalo estis tre bela kaj vere interesa.



Dum la tuta semajno la Informejo ĉiam estis malfermita je nia dispono kaj la budo por reklamado de la kanada UK, ankaŭ deĵoris tutan tagon ĉiutage. Mi gratulas ilin, ĉar oni aliĝis surloke ĉirkaŭ 90 homoj. Sur granda ekrano ĉe la hokea ludkampo la kanada LKK prezentis per profesiaj filmoj la belecojn de Kanado kaj la okazontajn ekskursojn tra tiu grandioza lando. Ŝajnas ke la afero sukcesas, ĉar mankas unu jaro.

Vokis mian atenton la Aŭkcio, ĉar amaso da homoj ĉeestis la eventon kaj ĉiuj objektoj estis facile aljuĝitaj, eĉ kelkaj kontraŭ altaj sumoj.

Mi, kiel poeto, tre ĝuis la libro-donacon al ĉiuj ĉeestantoj ene de la sako, ĉar temas pri la fama finna verko *Kalevala*, finna epopeo, bele tradukita en Esperanto, kiun mi tre ŝatas kaj mi gardos kiel literatura juvelo. Mi ankaŭ ĝuis la Libroservon, kien mi trovis novaĵojn pri tradukitaj kaj originalaj verkoj kaj mi salutis mian amikinin Heidi Goes, prezidantino de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, kiu ĉi jare ricevis la Premion Deguĉi, kaj danke la ŝi mi konatiĝis kun esperantistoj el Orienta Timoro, kun kiuj mi kontaktas, precipe kun Mateus de Sena Mali-tai. Ŝi multe laboras por instrui la internacian lingvon kaj samtempe lerni la indiĝenan. *Movadaj Insuletoj* estas rekomendinda libro verkita de ŝi. Nuntempe, se mi ne eraras ŝi disvastigas Esperanton en Angolo.

La Movada Foiro, ankaŭ sukcesis ĉe la granda Halo kun bona etoso, kelkaj landoj ofertis propagandon pri kongresoj, donacetojn, gustumadon de teo, ktp. Hispanio kune kun Italio kundividis tablon kaj ambaŭ reklamis kaj pri la hispana kaj la itala kongresoj en bona harmonio.

Mi ne ĉeestis la tutagan ekskurson, ĉar mi tre ŝatis viziti la ski-saltejojn kaj mia revo realiĝis, ĉar grupo da homoj pripensis tiun aferon kaj kune atingis, unue per telfero kaj due, per lifto ni ĉiuj praktikis Esperanton sur la plej alta parto de la ski-saltajoj, ĉar ni estis bone akompanataj de finna ĉiĉerono, kiu volonte klarigis al ni ĉiujn demandojn pri la senegalaj belecoj de la urbo Lahtio kaj ĉirkaŭaĵoj.

Estus necese kelkaj paĝoj por raporti pri la neforgesebla sperto ĉe la lando de la neĝo kaj malvarmo, kie ni ŝvitis tage kaj nokto pro la klimat-ŝanĝo.



Nun mi pripensas la aferon ĉeesti la venontan UK-on en Kanado, ĉar mi timas ŝviti kaj ne ĝui la neĝon kaj la blankajn panoramojn, kiun mi imagas, ĉar mi nur scias pri Kanado kiel malvarma lando same kiel mi pli malpli imagis Finnlandon, tamen mi tre ĝuis la bonan etoson ne nur inter geesperantistoj, ankaŭ inter finlandanoj, ĉar ĉe la urbo-centro, multaj geesperantistoj kunsidis ĉe interesa trinkejo, kie la unua tago ludis la grupo Asorti kaj pleniĝis la lokalo.

La multekosta biero abundis kaj la esperanta etoso miksiĝis kun la surprizitaj neesperantistoj, kiuj restis kun ni ĝis la fino. Ĉe la pordo de la trinkejo flirtis la esperanta flago, kiu restis tie ĝis la fino de la kongreso.

Ángel Arquillos

RENKONTIĜO DUM LA DOUGLAS-TAGOJ EN TEBO (MALAGO)

Dum la famaj Douglas-Tagoj, ĉiujara festo, mi organizis renkontiĝon. Por ebligi tiun aranĝon mi devis pretigi prezentaĵon kiu enhavas informon kaj fotografiojn de la vilaĝo. Jen ĝi: <https://www.dropbox.com/s/870gicw1gjf65/Prezenta%C4%B5o%20pri%20Tebo.pdf?dl=0>

Mi publikigis ankaŭ la informon en mia blogo kaj en kelkaj retpaĝoj kaj ankaŭ la Hispana Esperanto-Federacio volonte diskonigis ĝin en Twitter kaj Facebook.

Malgraŭ ĉiuj klopodoj, nur ĉeestis unu homo. Sed ne ĉio malbonas; la renkontiĝo estis superba!

Kio okazis dum la renkontiĝo? Nu, la ĉefa aktivaĵo estis la ĉiĉeronado; profesia ĉiĉeronado. Danke al la prezentaĵo mi povis eksplicite la historion de Tebo montrante fotografiojn kaj eĉ verkojn pri la vilaĝo. Sed ni ankaŭ povis ĝui la viziton en la muzeo kaj en la kastelo, ĉar tiam ambaŭ estis malfermitaj por ĉiuj homoj kiuj volus lerni pli da historio. En la muzeo estas multaj restaĵoj interesaj; ekde la prahistorio ĝis la moderna epoko. Tie nin ravis la mirindaĵoj faritaj de la romianoj (bustoj, moneroj, skulptaĵoj, i.a.) kaj de alia prauloj. La intereso de la kastelo estas ne nur en la ĉefa turo, sed ankaŭ ekstere. Ĉirkaŭas ĝin muroj preskaŭ detruitaj pro la tempo kaj pro la agoj de la homoj

(dum la Sendependenca Milito parto de la muro estis pafita de la francaj trupoj per kanonoj). Ene estas mapoj, libroj, flugfolioj, glavoj kaj eĉ armaĵo!



Post la ĉiĉeronado, ni pri-diskutis la disvastigadon de Esperanto en la vilaĝo kaj en apartaj lokoj. Fakte, mi faris flugfoliojn por disdoni, sed bedaŭrinde ili ne alvenis ĝustatempe. Tamen, ni konsentis plu kaj pli disvastigi nian

lingvon estontece, jen disdonante flugfoliojn, jen prelegante.

Parenteze, mi organizos alian renkontiĝon dum Douglas-Tagoj venontjare. Vi ĉiuj estas invititaj!

Alejandro Burgos

KRONIKO PRI ONIKRIMOJ (recenzo)

Septembre, surstrate en Tokio. Granda Tertremo en la regiono Kantô 1923 – Postsono de Masakro, de Katô Naoki, el la japana tradukis Mamiya Midori, Korocolor, Tokio, 2018, 205 paĝoj, 21 cm, ISBN 9784907239367.

Mi legis tiun ĉi libron en la urbo Pingtongo, en Tajvano, insulo kaj lando kiujn la japana imperio koloniis de 1895 ĝis 1945. Kaj jen kiel komenciĝas la antaŭparolo por la esperanta versio: "En septembro 1923, trafis Tokion senprecedenca tertremego. Pereis 105 mil homoj pro urba incendio en kelkaj tagoj. Poste, en la kaosa stato, japanaj popolanoj kaj soldatoj masakris en sia kolero sennombrajn laboristojn koreajn kaj ĉinajn".

Temas pri tio kion en Hispanujo oni nun nomas "historia memoro". Ĉi-okaze nome eviti forgesi la tiaman murdadon de koreaj kaj ĉinaj laboristoj (kaj, escepte, de junaj japanaj aktivuloj de laborista sindikato, aŭ de japanoj kiujn oni "erare" mortigis kredinte ilin koreoj aŭ ĉinoj).

La aŭtoro faras tion per prezentado de realaj atestoj (kun la veraj nomoj kaj de multaj murditoj kaj de iuj murdintoj aŭ murd-instigintoj) ne nur fare de supervivintaj koreaj viktimoj sed ankaŭ de personoj kiuj pasive aŭ eĉ aktive ĉeestis la krimojn; de aŭtoritatoj kaj poliestroj mem disvastigintaj falsajn informojn pri neokazintaj ribelo aŭ atencoj fare de koreoj (iuj ĵurnaloj faris simile); kaj, cite el diversaj fontoj, atestoj de volontulgrupanoj, policanoj kaj soldatoj kiuj kunkulpis kun japanaj popolanoj aŭ civitanoj en la mortigoj de koreoj kaj ĉinoj, kaj eĉ kiuj rekte mortigis.

La ĉapitroj aperis unue kiel artikoloj en specifa blogo pri la temo, kiu esploras ankaŭ la radikojn de tiaj krimoj (plej ofte en ligo kun rasismo kaj naciismo) kaj la konkretajn motivojn de la krimintoj por agi tiel, ĉefe la kredo je onisupoj pri imagitaj putvenadoj aŭ dombruligoj fare de koreoj, en kombino kun la paniko de elitoj obsedataj pri t.n. "publika ordo". Similan fenomenon oni observis jardekojn poste en aliaj regionoj de la terglobo kiel Ruando, eksa Jugoslavio aŭ Nov-Orleano (Usono) post la uragano Katrina en 2005.

Ni faru momente paŭzon aŭ parentezon pri la esperantigo. La kutimaj esperantujaj 'gramatakiŝtoj' eble plendos pri iuj eraretoj aŭ nekutimaj lingvouzoj, el kiuj mi menciis nur jenajn: artikolo antaŭ monatomoj (p. 13: "la julio", kaj plu en la libro), eble pravigebla anst. majusklo, malgraŭ la tradicio, tamen ne uzata sisteme de la tradukinto; trouzo de "kvazaŭ" anst. simpla "kiel" (en komparo, la ĝenerala komparvorto "kiel" sufiĉas, dum "kvazaŭ" tro emfazas la kvazaŭecon); probabla misuzo de "sia" (p. 45, noto 1, en "mortigi sian ĉefon" kredeble devus esti "lian", t.e. aliulan, ne la ĉefon de la mortiganto mem); "konsistata" anst. "konsistanta"; "apenaŭ" anst. "preskaŭ" (p. 85, 144); "Inferno" anst. "infero" (p. 187); sampaĝe, se blankulojn la tradukinto nomas blankuloj, kial li uzas por nigruoj apartan radikon "negroj"? (mi mem sentas tion ekdiskriminacia lingvero).

Persone al mi plaĉas la tradicia sobra, rekta, simpla (kvankam al mi ne ĉiam tute klara) stilo de japanoj, kio cetere neniel implicas elekton de nur fundamentaj radikoj aŭ simile. Kial "al mi ne ĉiam tute klara"? Eble pro la ĝisnuna troeŭropeco de la vorta kaj fraza sintaksoj de onia Esperanto. Indas legi ĉi tiajn verkojn jen kaj jen por forlavi de sia Esperanto almenaŭ iom de tiu troa eŭropida lingva rigideco. Kio tamen ne malvalidigas la ĉiaman dezirindecon de revizio fare de ali-lingvaj kompetentuloj, ne nur de japanoj. Nu, ni konsciu ke tiu ĉi verko temas pri masakro kiel ĉenero inter du militoj: same kiel la krimoj de japanaj soldatoj en Ĉinujo kaj Koreujo komence de la dudeka jarcento antaŭtempis la malhumanan linĉadon de senkulpaj, sendefendaj eksterlandaj civitanoj en Tokio kaj aliaj urboj en 1923, ankaŭ tiu ĉi murdaro siavice antaŭtempis la fifarojn de la japanaj imperio kaj armeo en Azio en la sekvaj du jardekoj, ĝis Aŭgusto 1945 (kompareble, estas konate ke generalo Franco, dum la hispana interfrata milito, realigis kolonian militon kiel tiun jam provitan de li en norda Afriko, kaj same faris Hitler tra tuta Eŭropo dum la dua militigo, traktante civitanojn kiel nehomojn).

La ĉi-supre menciitaj atestoj kune kreas faktofidele rakontan raporton pri la sinsekvo de la murdoj, inkluzive de harstarigaj detaloj pri la mistraktado de kadavroj, sed ankaŭ pri la aktiva kaj riska defendo de persekutataj koreoj fare de iuj japanoj.

Prave oni legas sur p. 195: "Nei la fakton de la masakro signifas prepari estontan masakron". Sed la aŭtoro trafte rilatigas la lokojn de la tiamaj buĉadoj kun la nuno, ekzemple kun la samaj hodiaŭaj kvartaloj de Tokio, de kiuj presitas fotoj. Ĉio tio bonvenas en la

nuna epoko de falsaj novaĵoj, informoj kaj onidiroj, kiam eĉ verdkoraj "samideanoj" facil-anime balotas por Bolsonaro, Duterte, Farage, Netanjahu, Orban, Salvini, Trump, Abascal kaj aliaj naciisme fremdulfobiaj popolflataj politikistoj.

Japanaj esperantistoj povas kaj devus legi tiun ĉi verkon ĉu en Esperanto ĉu en la japana originalo. Ni, ali-naciaj legantoj, pensu pri rasismo kaj rasismaj krimoj en niaj propra lando, historio, medio, vivo.

[Tiu ĉi recenzo aperas samtempe en *Beletra Almanako*, *Boletín* de HEF kaj *Formoza Folio*]



Jorge Camacho

SAT-KONGRESO EN BARCELONO

Ĉijare, krom la malaga kongresaro, okazis alia grava Esperanto evento, nome la 92a SAT-kongreso, per kiu SAT venis ses jarojn poste denove al Iberio.



La ĉi-jara SAT-kongreso en Barcelono disvolviĝis inter la 4-a kaj la 11-a de aŭgusto, kaj kiel ofte okazas, en somermeza varmego. La OKK, komponita de Saïo Escobar kaj Xavi Alcalde, trovis tre konvenan trankvilan kongresejon, tute aparte de la urbocentro.

La kongreso elstaris per pli ol kutime multnombraj 220 partoprenantoj, dum ofte estis ĉirkaŭ 100 ĉe antaŭaj tiaj kongresoj. Inter ili multaj ne-SAT-anoj, kaj precipe por ili oni aranĝis specialan enkondukan kunvenon por unuafojaj kongresanoj. Por tiuj, kiuj bezonis, okazis ĉi-foje lingvokursoj.

La SAT-specifaj ĝeneralaj laborkunsidoj, kunsidoj de LEA-komitato, Poresperanta Fako, Eldona Fako Kooperativa, frakcioj (liberecana, komunista, sennaciista, Vegetara Sekcio) disvolviĝis laŭ la kutima maniero. Ĝuste la prelega kaj kultura programoj estis pli ol kutime riĉaj. En la sociaj forumoj okazis debatoprezentoj pri Katalunio, Koreioj, anarkiismo/socialismo/komunismo, la rolo de Esperanto en alternativaj eldonprojektoj, ĉifrovalutoj, “Niaj sentoj pri ebleco de disfalego de nia vivmaniero”, sinliberigo de la GAFAM (Google, Apple, Facebook, Amazon, Microsoft). Krome troviĝis pli originalformaj programoj kiel peĉakuĉoj (bildoprezentoj kun klarigoj daŭrantaj po ses minutoj kaj kvardek sekundoj pri tre diversaj temoj, ekz. pri rifuĝintoj en Samoso kaj en Francio, historio de la kongresejo, naturkuracado, mondmapoj, bitarkivo, Klara Zamenhof, memfarita libroskanilo ktp.). Novaj libroj estis prezentitaj, inter kiuj baldaŭ aperonta nova eldono de la SAT-furoraĵo *PIV* kaj pluraj dulingvaj verkoj de eldonejo *Calúmnia*. Spektitaj estis filmoj Esperante subtekstitaj, notinde la fama *Tero kaj Libero* de Ken Loach, *Empatio* de Ed Antoja, *La bruligita urbo* (katalune : *La ciutat cremada*) de Antoni Ribas, kaj pluraj pliaj). Kongreskonklude estis fotokonkurso kaj jam tradiciiĝinta aŭkcio.

Ĉiuvespere oni ĝuis artajn spektaklojn. Eksterordinara estis la koncerto *Mia liriko kaj muziko* de Miguel Fernández. Franjo Martin gvidis kant-atelieron, *Ni kantu la Revolucion*, kun gitar-akompano de Xavier Rodon. La partoprenantoj ĉe la fino prezentis aron da revoluciaj kantoj. Miguel Fernández prezentis sian tradukon *Ha, Karmela* kaj sian poemaron *Rev-ene*. Franciska Toubale emociplene deklamis la poemon *Ankaŭ mi estas homo*. Entuziasmon atingis koncerto de JoMo, kiu post kelkaj revoluciaj kanzonoj dancigis la publikon tiel fervore, ke ĉe la lasta kanto rompiĝis al lia gitaro du kordoj. Saŝa Pilipoviĉ krom la teatraĵo *Vivo de Galileo* prezentis Universalan Kabaredon kaj kantis ciganajn kantojn. Eŭskajn kantojn kun gitar-akompano prezentis juna knabo Porru-mentzio. La lastan vesperon koncertis la fama kataluna grupo Kaj Tiel Plu en unu ĝardeno angulo. La intereson de la publiko vekis pupteatraĵo *La sorĉistino kaj s-ro Kristoforo* prezentata de profesia kompanio *Títeres Desde Abajo* (Desubaj pupoj), kiuj originale enmetis iom da Esperanto en sian verkon. Pro tiu teatraĵo ili estis antaŭ tri jaroj enkarcerigitaj dum kvin tagoj, atence al la liberesprima rajto, pri kio ja ankaŭ temis en la teatraĵo.

La plej multjara SAT-membro Eduardo Vivancos loĝas en Kanado, sed originas de Barcelono. Pro sia alta aĝo li ne povis ĉeesti la kongreson. Lia fratino Juliette Ternant transdonis salutmesaĝon de li kaj kongresanoj partoprenigis lin en la kongreso per surpriza rekta telefona kontaktiĝo. Tiu estis tre kortuŝa programero.



Pro la abunda partopreno de lokanoj plejparte ne-SAT-anoj, la kongresanoj havis multe da neformalaj diskutokazoj kaj unu organizitan socian forumon pri la politika situacio en Katalunio, atentata de homoj ĉirkaŭ la mondo en la lastaj jaroj. Ankaŭ eksterkongrese ĝi ne pretervideblis pro la multaj afiŝoj, mursurskriboj kaj precipe katalunaj flagoj pendantaj el fenestroj kaj aliloke. Kiel atendeble, formiĝis komuna starpunkto

nek por nek kontraŭ la sendependiĝo de Katalunio, sed en la kongresa Deklaracio formuliĝis pli singarde esprimita akordo pri tio, ke “konsiderante la situation en Katalunio dum la lastaj jaroj, [la kongreso] esprimas sian zorgon pri la fakto, ke batalo inter du naciismoj povas damaĝi la bazajn homajn rajtojn, kiuj devas esti respektataj de ĉiuj, kaj alvokas la popolojn kaj registarojn al klopodo solvi la politikajn kaj sociajn problemojn pere de pacaj, liberesprimaj kaj demokratiaj solvoj, kaj tiucele postulas la liberigon de la politikaj malliberuloj”.

La urbo kaj regiono estas plenaj de vidindaĵoj kaj la kongreso estis unika okazo por viziti ilin – malgraŭ, ke somere la urbon sieĝas turistoj. La kongresejo mem estis unike bela domo de salesianoj en trankvila periferia apudmontara kvartalo. Kongresanoj en la malmultaj liberaj momentoj povis promeni tra kreskaĵoriĉaj, malnovaj, intense flegataj ĝardenoj kun fontanoj, statuoj kaj palmoj.

Ĉar la plej vizitindaj turismolokoj en la urbo estis ne tiom altiraj konsiderinte la svarmon de turistoj kaj ŝtelistoj, la kongreso preferis alitipan turismon, nome al socipolitikaj aferoj, Esperantaj bibliotekoj, filmoj kun ideologia enhavo, okupita socia centro ktp. Duontaga ekskurso al Can Masdeu montris alternativan vivmanieron de malgranda komunumo de 30 personoj en memmastrumata socia centro, estiĝinta en 2001 per okupo de forlasita eksa lepromalsanulejo rande de Barcelono. La ĉeestantoj povis elekti inter du tuttagaj ekskursoj. La unua malkovris al ili la ĉirkaŭaĵon de Subirats, historie grava kiel la lasta defendlinio de Barcelono dum la milito, kaj ankaŭ loko de muzeo de Esperanto fondita en 1968 de Luis Hernández Yzal. En la dua ekskurso, kies celo estis la surmonta monaĥejo Montserrat, oni vizitis ankaŭ la Esperanto-bibliotekon Ramon Molera en la urbeto Moià, gvidatan nun de lia filino Anna Maria Molera.

Kiel konkludo, Przemek Wierzbowski el Bjalistoko prezentis sian urbon al la kongresano, kiu decidis okazigi en tiu urbo la venontjaran SAT-kongreson.



Poesperanta Fakto

PLUAS LA “ELKATAKOMBIGO DE LA E-KULTURO” EKSTER ESPERANTUJON EN MADRIDO

Miguel Fernández

La pasintan 8an de junio, en “La Cacharrería”, la plej fama salono de la Madrida Ateneo, “la dokta domo”, laŭ la hispana dramaturgo Valle-Inclán, oni prezentis la hispanlingvan poemaron *Aire verdadero* [Vera aero], de mia kolego kaj amiko la madrida poeto, filologo pri la hispana kaj parolisto ĉe Radio Utopía Armando Silles McLaney, kultur-homo tre favora al Esperanto, kvankam ne esperantisto. La enkondukajn vortojn Silles komisiis al mi fari. Krome, petite kaj de li kaj de kelkaj ĉeestantoj, mi deklamis mian esperantigon de unu el la poemoj en la poemaro, kio estis varme akceptita de la publiko. La organizantino de la aranĝo, Victoria Caro Bernal, licenciita pri Filozofio kaj Sciencoj pri la Edukado ĉe la Madrida Universitato kaj konata poetino, aktorino kaj responsulino pri literaturaj babilrondoj en Ateneo, publike sin deklaris impresita de la beleco de nia lingvo kaj preta fari, ke la Madrida Ateneo institucie venigu Esperanton kaj la E-poezion en siajn kulturajn aranĝojn.

Jen la de mi elhispanigita kaj esperante deklamita poemo de Armando Silles:

SONĜO KAJ NOKTO

Tradormi volas mi sonĝon kaj nokton
el blankaj vualoj de spozinoj,¹
ian sonĝon de pomoj kaj oranĝoj,
endormiĝi konfuzplena pro la vino.

Sonĝu mi la mirindaĵon de la kisoj
kaj l’ aromon jasmenan el la buŝoj,
por, en mia delic’ naiva, scii,
kio estas la vort’ enamiĝinto.

Ke ne finiĝu ĉi nokto mi preferas,
river’ eterna, longa nokto, ne finiĝu:
matenojn timas mi, ties novaĵojn,
kaj timas la malvenkon de la kisoj.

Aliflanke, jen dua informo pri tio, kion multaj madridaj esperantistoj nomas “elkatakombigo de la E-kulturo” ekster Esperantujon: Blanca Gracia estas juna

¹spozino: virino edziniĝonta aŭ ĵus edziniĝinta. (*Neologisma glosaro*, de H. Vatrè).



Aliflanke, jen dua informo pri tio, kion multaj madridaj esperantistoj nomas “elkatakombigo de la E-kulturo” ekster Esperantujojn: Blanca Gracia estas juna pentristino, kiu, ĉefe en la du pasintaj okazigoj de Arco, la plej renoma artfoiro en Hispanio, rivelis sin talenta valoro inter la novgeneraciaj hispanaj geartistoj. Ŝi kultivas ankaŭ dramaturgion. Antaŭ nelonge, ŝi sin turnis al HEF (Hispana Esperanto-Federacio) kun la peto, ke ni e-istoj helpu ŝin pri ŝia teatra projekto *Rompu, rompu!* (jes, tiel, en Esperanto kaj kun jena, same esperante formulita klarigo: “rompu, rompu la murojn inter la popoloj!”), frazo ĉerpita el la inaŭgura parolado farita de Zamenhof kadre de la Dua Universala Kongreso, okazinta en Ĝenevo, en 1906). Temas pri baleta-muzika-bildadrama spektaklo, kies esencon ŝi jene (tamen hispanlingve, kompreneble) klarigas en jam farita kaj diskonigata afiŝo: “En la nuntempo, saturita de kodoj, la komunika funkcio de la lingvo rompiĝis, mesaĝoj re kaj re saltas sen alveni ien, senaj je signifo kaj malhelpantaj la komprenon pri nia ĉirkaŭaĵo. Surbaze de eksperimentado super diversaj



teatraj rimedoj, *Rompu, rompu!* serĉas esplori la homan mankon de komuniko kaj la politikojn pri la Voĉo en la erao de diĝite tuteca rigardo al nia ĉirkaŭo. Uzante la folkloron kaj la klasikajn mitojn kiel startopunkton, en ĉi ĥora verko miksiĝos la greka mito de Eĥo kaj Narciso, la figuro de la ŝekspira Kalibano kaj Esperantistaj Brigadoj imagitaj pretaj doni sencecon al nia nunto”.



Esperanto do aperas, krom en la titolo, en la tria akto de la teatraĵo. Blanca petis nin esperantigi ties prian tekston kaj instrui la aktorojn prononci la esperantajn vortojn en ĝi. Entuziame mi mem tuj surprenis la tradukan taskon. La madruda e-isto Alejandro Pareja proponis sin kiel prononc-instruiston antaŭ ol mi mem kontrolos la finan intonacion de la aktoroj. La verko premieros en novembro, en Matadero Municipal, unu el la plej gravaj, moderne ekipitaj kaj progresemaĵ kulturaj centroj en Madrido. La pasintan 29an de junio okazis publika provludo de la unua sceno de *Rompu, rompu!*, kiu, kiel dirite, temas pri la mito de Eĥo kaj Narciso. Blanca invitis ĉiujn HEF-anojn, ĉefe tiujn engaĝiĝintajn en la verkon, ĉeesti ĝin. La madridaj geesperantistoj Ana

Manero, Manolo Parra kaj mi mem plej volonte akceptis la inviton kaj, spektinte la provludon, ni deklaris nin ravitaj de la prezentado, vere altnivela kaj belega, kaj de la persona konatiĝo kun la aŭtorino, inteligenta, ĉarma, dankema kaj plena de entuziasmo al nia afero kaj al arto.

Senpacience ni atendas la provludon de la tria sceno de la verko, kie Esperanto rolos apoteoze, en la formo de parolado, hispanlingve aperonta surekrane, kaj kiel ĉefa ero de festo de la interkomunikado, kun ĉiuj geaktoroj sur la scenejo, kun esperantaj bildoj kaj kantoj, kun plurkoloraj lumoj kaj standardoj...

Siatempe ni informos la esperantistaron pri la irado de la premiero de *Rompu, rompu!*, kiu, kiel oni jam anoncas, okazos la 29an de novembro 2019.

Ni ne dubas, ke ĝi estos vere sukcesa, kiel meritas ĝia kreanto, la brila juna hispana artistino Blanca Gracia, kiu konceptis belan nuntempan spektaklon, kie Esperanto grave rolas jam de la titolo.



Senkulpigo:

En la numero 426 Aprilo-Junio 2019, kadre de mia artikolo *El "Mia liriko kaj la muziko"*, p. 30, legeblas la esprimo "mia tria poemaro, *El miaj sonoraj soloj*". Fakte, mia tria poemaro estas ne *El miaj sonoraj soloj*, sed *Rev-ene*, publikigita de SAT – Eldona Fako Kooperativa en 2018. Mi senkulpigas min antaŭ la legantoj de *Boletín* pro tiu eraro nur al mi mem atribuebla.

Miguel Fernández

79^a

HISPANA ESPERANTO- KONGRESO

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Comillas Kantabrio 2020

de la 30a de aprilo
ĝis la 4a de majo

